

GUSTAVE ROY

---

KIEL NEŬTRA=MORESNETO

FARIĜIS

# AMIKEJO

---

PREZO	}	SD . . . . .	10
		PFENIGOJ . . . . .	20
		PENCOJ . . . . .	2½
		CENTIMOJ . . . . .	25
		HELEROJ . . . . .	24
		KOPEKO . . . . .	1

---

PARIS  
LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO  
15, RUE MONTMARTRE, 15

—  
1908

# LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO

G. WARNIER & C<sup>ie</sup>

13, Rue Montmartre — PARIS (1<sup>er</sup> Arr.)

La katalogoj estas sendataj senpage.

## Eltirajo el la Ĝenerala Katalogo.

(Aldoni 10 % por la sendelspezoj.)

### LITERATURO

#### *Literaturo Esperantista originala*

822. LENGYEL (P. de). — Libro de l'Humorajo.  
(dua eldono) . . . . . 2 50
446. MALFELIĈULO (Ivan). — Sep Rakontoj . 1 »
664. VALLIENNE (D-ro). — Kastelo de Prelongo  
(romano) . . . . . 4 »
802. KABE. — Unua Léolibro . . . . . 1 90

#### *Antologioj - Miksaĵoj*

455. DEVJATNIN. — Verkaro (libro I-a) . . . 2 »
456. — Verkaro (libro II-a) . . . 2 75
458. ZAMENHOF (L.) — Fundamenta Krestomatio  
de la lingvo Esperanto . . . . . 3 50
159. \*\*\*. — Esperantaj Prozaĵoj (fabeloj kaj ra-  
kontoj) . . . . . 2 50
536. \*\*\*. — Internacia Krestomatio, trad. Kabe. 1 25
586. \*\*\*. — Literatura aldono de « Lingvo Inter-  
nacia », jaro 1905. . . . . 2 50
587. \*\*\*. — Literatura aldono de « Lingvo Inter-  
nacia », jaro 1906. . . . . 2 50
882. \*\*\*. — Malnovaj paĝoj el « Lingvo Inter-  
nacia » . . . . . 1 25

#### *Angla Literaturo*

469. SHAKESPEARE. — Hamleto, trad. D-ro  
L. Zamenhof . . . . . 2 »
470. SHAKESPEARE. — Julio Cezaro, trad. D-ro  
Lambert. . . . . 2 »

Donaco de *Societo p. l. propagacion de l' Paris* <sup>Bo.</sup>

GUSTAVE ROY

---

KIEL NEŬTRA=MORESNETO

FARIĜIS

AMIKEJO

---

PREZO	}	SD . . . . .	10
		PFENIGOJ . . . . .	20
		PENCOJ . . . . .	2½
		CENTIMOJ . . . . .	25
		HELEROJ . . . . .	24
		KOPEKO . . . . .	1

---

PARIS  
LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO  
15, RUE MONTMARTRE, 15

1908

700572-A. Esp

Proj: 5271

# KIEL NEŬTRA=MORESNĚTO

FARIĜIS

## AMIKEJO

---

---

### I. — Graveco de Amikejo

Amikejo estas neŭtra landeto (337 hektarojn) inter Belgujo kaj Germanujo, ne malproksime de Namur kie kruciĝas la du ĉefaj fervojoj de la mondo : la fervojo Lisbono-Madrido-Parizo-Berlino-Peterburgo kaj la fervojo Konstantinoplo-Vieno-Bruselo-Londono. Amikejo kuŝas do apud granda trairejo de la homaro.

Dank' al la neŭtra lingvo, neŭtra kongresejo de la popoloj povas fariĝi apud tiu granda trairejo.

Tiam estos Amikejo ne nur tre bona poresperantilo, sed ankaŭ tre bona peresperantilo. Ĝi estos ne nur esperanta lando kie oni senĉese trovos la okazon perfektigi en la internacia lingvo, ĝi estos ankaŭ kaj precipe neŭtra kunvenejo de ĉiuspecaj internaciaj delegitoj. Sekve la internaciaj rilatoj plimultiĝos, plifortiĝos; alivorte ni vidos malvolviĝi la « internan ideon » de Esperanto, laŭ la esprimo de D-ro Zamenhof.

Se ni speciale konsideras ke la prefere ekzamenotaj demandoj estas la faktoj ekonomiaj, ununuraj kaŭzoj de l'paco kaj de l'milito, tiu ekzameno kaj la ĝin sek-

vontaj decidoj aperos al ni kiel nova garantio de monda paco, kiel plia malvolviĝo de la « ideo interna ». Amikejismo, oni povas diri, estas la realigo de la monda paco per agado sur la faktoj ekonomiaj, kaŭzoj de l'paco kaj de l'milito. Supoze ke Amikejismo estas ĥimero, nia devo estas penadi por atingi tiun ĥimeron.

## II. — Fondo de Amikejo

La titolo de mia franca broŝuro eldonita en Februaro estas : « *Projet d'un Etat espérantiste réalisable en six mois* », projekto de esperanta ŝtato realigebla en ses monatoj. Baldaŭ estos pasintaj la ses monatoj ; ĉu estas fondita la esperanta ŝtato ?

Kio estas esperanta ŝtato ?

Anglujo estas industria ŝtato, Holandujo estas paŝteja ŝtato. Tio signifas ke Anglujo estas karakterizata de industrio, ke Holandujo estas karakterizata de paŝtejoj. Esperanta ŝtato signifas ŝtato karakterizata de Esperanto.

Ĉiuj mondaj ŝtatoj enhavas esperantistojn, konsekvence ŝtato povas esti karakterizata de Esperanto nur enhavante laŭproporcie pli da esperantistoj ol iu ajn alia.

Nu, Amikejo enhavas 4.000 loĝantojn kaj 135 esperantistojn. En kiu lando troviĝas tia proporcio ?

Plie, tiuj esperantistoj ne estas homoj kiuj uzurpisan nomon. Ili dispeciĝas en tri grupoj (infanoj 70, sinjoroj 40, sinjorinoj 25), kaj ĉiu grupo, sub la patronado de la ŝtatestro, ricevas en la ŝtata lernejo du lecionojn semajne.

Esperanto, cetere, karakterizas Amikejon pro alia tialo. Dum la pariza internacia kongreso de komercovojaĝistoj, en la lasta Junio, mi fondis internacian asocion de esperantistaj komercovojaĝistoj havantan sian sidejon en Amikejo kaj celantan favoradi la internacian komercon per la disvastigo de Esperanto en la mondo de la komercovojaĝistoj.

### III. — Penadoj kaj Klopodoj

La franca broŝuro estis ĵus aperonta kiam mi legis en diversaj ĵurnaloj ke Germanujo anigas al si Neŭtran-Moresneton. Kelkajn tagojn poste, la germana legacio en Bruselo kaj la belga legacio en Berlino respondis al mi : Tiu informo pri Neŭtra-Moresneto publikiĝas periode en la gazetaro, sed ĝi estas neĝusta. La belga legacio aldonis : por ke la neŭtraleco de Moresneto ĉesu, tiu demando devus esti priparolata en la germana kaj en la belga parlamentoj, poste ambaŭ parlamentoj devus interkonsenti pri speciala leĝo.

Do la kutimaj informoj rilate al l'anigo aŭ al la dividado de Neŭtra-Moresneto ne estas konsiderindaj.

La bruo kiun ĉiulandaj ĵurnaloj faris ĉirkaŭ la broŝuro alkondukis al mi sindonemajn helpantojn, unue leŭtenanton Giminne, el Bruselo, kiu donacis tempon, paroladojn, monon ; abaton Richardson, veran apostolon ; sinjoron Charles Schriewer, tre energian kaj tre inteligentan junulon, nun konsulon kaj profesoron de Amikejo. Tiuj tri samideanoj, eĉ samanimanoj preparis paroladon kiun sinjoro Ruhl, el Verviers, faris germane al la loĝantaro de Neŭtra-Moresneto. Kiel

sekvo de tiu efika kunlaboro stariĝis la tri esperantaj kursoj.

Se la granda allogo de S-ro Ruhl, homo rimarkinda pro sia klereco, riĉeco kaj boneco, ankoraŭ sentiĝadas en Neŭtra-Moresneto, ne malpli sentiĝadas ĉe diverslandaj komercovojaĝistoj aŭ komercistoj la granda allogo de S-ro Ullmann, el Berlino, prezidanto de la internacia asocio de esperantistaj vojaĝistoj en Amikejo, vic-prezidanto de angla vojaĝista asocio, aŭtoro de ŝatindaj komercaj artikoloj en « Der Berliner Tageblatt » kaj en « Die Post reisender Kaufleute Deutschlands ».

Malfacile estas difini precize la partoprenon en niaj laboroj de multaj samideanoj el Bruselo, el Antverpeno, kaj de Moresnetanoj. Ilia modesteco faris ke mi divenas pli ol mi scias la taskon de ili efektivigitan. Dankon al ili, kiel cetere al la estraro de Neŭtra-Moresneto, al S-roj Boirac, Bourlet, Blanjean kaj al nia Majstro D-ro Zamenhof.

#### IV. — Estonteco de Amikejo

Nun Amikejo staras.

Nu, Amikejo devas prosperi.

I. — *Esperantista Bayreuth*. Amikejo posedas belektan teatron. Ĉiujare, je datoj kiujn ni anoncos per nia ĵurnalo “ La Voĉo de Amikejo ”, okazos en la teatro esperantaj ludadoj. Krom ili okazos dum la jaro multaj aliaj, ĉar la 135 esperantistoj de Amikejo scios post kelkaj monatoj monologojn, kantojn, komedion, dramon, kaj povos fondi bandon.



Belgaj, germanaj, holandaj, eĉ francaj grupoj kiuj ekskursos Amikejon povos ankaŭ uzi la teatron por siaj ludadoj. Ne forgesu ke Amikejo kuŝas je 8 kilometroj de la granda banurbo Aachen, kien, en la somero, venas tiom da fremduloj.

II. — *Internacia komercoĉambro*. Al la internacia komercovojaĝista oficejo kiu estos la hejmo de la vojaĝisto ni aldonos internacian komercoĉambro.

Ĝia celo estos tre diversa.

a). Prepari la unuiĝon de la diverslandaj komercolegaroj rilate al la vojaĝistoj, la unuiĝon de la diverslandaj komercolegaroj rilate al la patentoj kaj fabrikmarkoj; la unuiĝon de la diverslandaj procesadoj rilate al la bankrotoj, la unuiĝon de la diverslandaj sistemoj de pezoj kaj mezuroj, k. t. p.

b) Prepari internaciajn kongresojn, antaŭ ĉiuj ekonomiajn kongresojn, ĉar la komercaj demandoj estas por ĉiu homo la plej gravaj: de la komercaj demandoj dependas paco kaj milito. Do, internacian kongreson de komercovojaĝistoj, internacian kongreson de komercoĉambroj, internacian kongreson de enportistoj kaj eksportistoj, internacian kongreson de ekspeditoj, internacian kongreson de ŝipekipistoj, internacian kongreson de entreprenistoj k. t. p. Ili ebligos la malfermigon de halo por reklamtabuloj kaj komercaj specimenoj. Ili naskos ekspoziciojn kaj internaciajn foirojn.

## V. — Al la Esperantistoj

En multaj regionoj iam senakvaj, senvegetajaj, senanimaj, hodiaŭ fluadas fontoj, verdiĝadas folioj, briladas

floroj, maturiĝadas fruktoj, kantadas birdoj, homoj tage laboradas, vespere iras koncerton kaj teatron. Kiu magia vergo aliformigis tiujn regionojn ?

Ducent, tricent metrojn sub la grundo de tiuj regionoj, de pli ol mil jaroj kuŝis karbo. Unutage inĝeniero diris : mi volas ke tiu karbo el la profundaĵo eltiriĝu, ĝis la supraĵo supreniru. Kelkajn jarojn poste, industriaj urboj kovris la dezertajn regionojn.

Hodiaŭ Amikejo ĵus eknaskiĝis. Por ke, en baldaŭa estonteco, alilandaj homoj ĉu plezurerĉante, ĉu gajnerĉante dense rapidu al la koncertoj, al la teatroj de Amikejo aŭ al ĝiaj komercaj kongresoj kaj foiroj, kio estas necesa ? Ne eltiri karbon el senfunda ŝakto. Ĉar Amikejo estas apud la krucpunkto de la ĉeffervoj de l'mondo, ĉar Amikejo estas apud la kunlimo de tri grandaj nacioj, ĉar Amikejo estas en unu el la regionoj plej industriaj de la tero, ĉar Amikejo estas unu el la lokoj plej proksimaj de Hamburgo, Antverpeno, Londono, ĉar Amikejo estas neŭtra, ĉar Amikejo jam estas esperantigita, sufiĉas ke la esperantistoj volu helpi ĝin, sufiĉas ke ĉiu esperantista grupo sendu al Amikejo 10 spesdekojn po grupano, tio estas 20 pfenigojn, 2 ½ pencojn, 25 centimojn, 24 helerojn, sufiĉas alivorte ke Esperantistaro volu helpi sin kiel Robinson Crusoe en sia insulo.

## VI. — La Tri Genioj

Specialeco de Amikejo estas ke en ĝia deveno aperas la angla genio. Ĝi montriĝas en tiu fakto ke

senigitaj de ĉiuj helpoj, fidantaj nur al si mem, esperantistoj sciis tamen realigi la esencaĵon de Amikejo.

Aliparte la germana genio montriĝis en tiu fakto ke esperantistoj unue verkantoj, filozofoj, scienculoj, libramantoj, imitante D-ron Faŭst fermis siajn librojn por turni sin, kiel li, kiel la modernaj germanoj, al la praktika agado.

Siavice la franca genio montriĝas en tiu fakto ke esperantistoj elektis neŭtran, internacian landon en kiu, dank'al neŭtra, internacia lingvo, ili povos pli bone trakti internaciajn, mondajn demandojn, laborante tiel ne por siaj popolanoj sed por la tuta homaro.

## VII. — Gvideto por la Fremduloj

La interspaco de Aachen al Amikejo estas 8 1/2 kilometroj, piede 1 1/2 horo, tramveturilo 40 minutoj.

### 1. — *Horaro de la tramveturilo.*

Aachen-Amikejo. Antaŭtagmeze : 6.15 (nur semajnajn tagojn) 7.15, 8.15, 8.45, 9.15, 9.45, 10.15, 10.45, 11.15, 11.45. Posttagmeze : 12.15, 12.45, 1.15, 1.45, 2.15, 2.45, 3.15, 3.45, 4.15, 4.45, 5.15, 5.45, 6.15, 6.45, 7.15, 7.45, 8.15, 9.15, 10.25.

Amikejo-Aachen. Antaŭtagmeze : 7.00 (nur semajnajn tagojn), 8.00, 9.00, 10.00, 10.30, 11.00, 12.00. Posttagmeze : 12.30, 1.00, 1.30, 2.00, 2.30, 3.00, 3.30, 4.00, 4.30, 5.00, 5.30, 6.00, 6.30, 7.00, 7.30, 8.00, 8.30, 9.00, 9.30, 10.10, 11.10.

2. — *Hoteloj en kiuj oni parolas esperante :*

Hotelo Bergerhoff, kun esperanta teatro, — Esperanto-Trinkejo, — Restoracio Esperanto, — Restoracio Schmitz, — Restoracio Dahlen, — Restoracio Klinckens.

La taga eslpezo estas ordinare 5 frankojn po persono (loĝado kaj manĝado).

3. — *La Kvarŝtonoj.*

La kvarŝtonoj estas la kunlimo, la kunlimŝtonoj de Holandujo, Belgujo, Germanujo, Amikejo. Tien, kiel ĝin montras diversaj fotografiaĵoj, ekskursas multaj societoj el la kvar landoj. Tie oni faras en kelkaj minutoj unu el la plej internaciaj promenadoj, kaj oni surstaras la plej altan punkton de Holandujo.

4. — *Zinkminejo "La Vieille Montagne".*

Certe estas belege planti la verdan standardon inter la kvar ŝtonoj, atendente ke ĉe tiu plej alta punkto de Holandujo oni fondu esperantistan senfadenan telegrafejon. Certe kunveno de ĉiulandaj esperantistoj ĉe la kvarŝtonoj estas admirinda figuraĵo. Tamen, estas en Amikejo simbolo ankoraŭ pli bela, pli admirinda, ĉar, unue ĝi estas pli esprimanta, due ĝi havas la karakteron de la tri diritaj genioj.

La zinkminejo "La Vieille Montagne" estas iamaniere la aĵigita ideo, kiun D-ro Zamenhof nomas "ideo interna de Esperanto". Efektive, tiu societo popoligis, prosperigis, prosperigadas la neŭtran landon. Tutmonda kiel Esperanto, ĉar ĝi posedas industriejojn en Belgujo, Germanujo, Italujo, Francujo, Anglujo, Svedujo, Alĝerio, Tunizio, k. t. p., ĝi realigis en tiuj diversaj landoj tiom da plibonaĵoj por siaj

laboristoj ke la Tutmonda Pariza Ekspozicio en 1867 aljuĝis al ĝi premion da 1.000 frankoj.

Se tiu transnacia sindonemo estas franca genio, la propra kapableco de “ La Vieille Montagne ” pasi el la abstraktaj formuloj al senegala praktiko kiu faris el ĝi la plej potenca zinkminejon de l’universo, estas germana genio. Fine angla genio estas la progresado de tiu societo dank’al la espero kiun ĝi metis ĉiam nur en sin mem, dank’al la helpo kiun ĝi serĉis ĉiam nur en si mem.

S-ro Timmerhans, la direktoro de “ La Vieille Montagne ” en Amikejo, havas la karakteron de la tri genioj : fidanta sin mem, saĝe administranta, li estas ankaŭ la neniam lacigita bonfaranto de Neŭtra Moresneto, la patro de la lando, kiel diras angla ĵurnalo.

Ni faru bondezirojn — eble frenezajn — por ke la zinko Amikeja iĝu en la Esperantistaro emblemo kiel la kanabo (la pantagruelion) ĉe Rabelais ; ke ĝi iĝu la emblemo de la “ ideo interna ” de Esperanto !

##### 5. — *Aersanigejo.*

Neŭtra Moresneto estas konata en la ĉirkaŭaĵo pro siaj aerkuracadoj. Dezirinde estas ke tiu eco kiel plej eble dispublikiĝu.





# CHAMPAGNE

## E. Mercier & C<sup>ie</sup>



Exigez la marque

E. Mercier & C<sup>ie</sup>

Insist on having the mark

E. Mercier & C<sup>ie</sup>

Verlangt die Marke

E. Mercier & C<sup>ie</sup>

Esigete la marca

E. Mercier & C<sup>ie</sup>

Exigid la marca

E. Mercier & C<sup>ie</sup>

Требуйте марку

E. Mercier & C<sup>ie</sup>


Postulu la markon

E. Mercier & C<sup>ie</sup>

†  
ÉPERNAY

(France)





*Bordeaux*

*Carbonnel (A. B.)*

Chemin Tregey, 10, 12.

BORDEAUX-LABASTIDE



*Bourgogne*

*Larisot, Ch.*

A BEAUNE (COTE-D'OR)





# BOULESTIN

## COGNAC (France)

La marque  
**BOULESTIN**  
a toujours été et  
est encore la  
meilleure.

La marca  
**BOULESTIN**  
ha sido siempre  
y es todavía la  
más buena.


The mark  
**BOULESTIN**  
has always been  
and still is  
the best.

La marca  
**BOULESTIN**  
è stato sempre  
ed è ancora  
la migliore.

Die marke  
**BOULESTIN**  
ist immer die beste  
gewesen und ist  
noch die beste.

Марка  
**BOULESTIN**  
была и есть  
всегда  
наилучшая

La marko **BOULESTIN**  
estis ĉiam kaj estas  
ankoraŭ la plej bona.



---

# Commercial References

## Cooper Craig & Craig

---

145, Cheapside E. C. LONDON.

o

Renseignements commerciaux

- - Handelsauskunftei - -

- Informes commerciales -

- Informazioni commerciali -

Коммерческія свѣдѣнія

- - Komercaj informoj - -

o




# Magasins


# du Louvre

## PARIS


Les plus vastes du monde.  
Demandez le Catalogue.




The largest in the world.  
Ask for the Catalogue.




Die grössten auf der Welt.  
Verlangt den Katalog.




Los más grandes del mundo.  
Pedid el Catálogo.




I più vasti del mondo.  
Demandate il Catalogo.



Обширнѣйшіе въ мірѣ.  
Требуите Каталогъ.



La plej grandaj de l' mundo.  
Mendu la Katalogon.





# Duchemin



20, rue de Grammont, 20

PARIS



Si vous voulez voyager à l'Étran-  
ger, adressez-vous à

===== **l'Agence DUCHEMIN.**

If you want to travel abroad,  
apply to

===== **DUCHEMIN's Agency.**

Wollt ihr in fremden Ländern  
reisen, so wendet euch an die

===== **DUCHEMIN's Agentur.**

Para viajar en paises extranjeros  
dirigios á

===== **la Agencia DUCHEMIN.**

Per viaggiar all' estero, diri-  
gersi all'

===== **Agenzia DUCHEMIN.**

Если Вы намѣрены отправиться  
за границу, обратитесь

===== **къ Агентству DUCHEMIN.**

Por vojaĝadi en fremdaj landoj  
turnu vin al

===== **l'Agentejo DUCHEMIN.**



== Parfumerie ==

DELETTREZ

28, Rue Matignon

== PARIS ==

*Les parfums les plus renommés du monde  
sont les parfums de la Maison DELETTREZ.*



*The most famous perfumes all over the  
world are DELETTREZ's perfumes. ♣ ♣*

*Die berühmtesten Parfumerie-Waaren auf  
der Welt sind die der firma DELETTREZ.*



*Los perfumes más renombrados del mundo  
son los perfumes de la casa DELETTREZ.*

*I profumi p'ù rinomati del mondo sono i  
profumi de'la di'ta DELETTREZ. ♣ ♣ ♣*



*Наибольше известныя въ міръ духи, духи  
фирмы DELETTREZ ♣ ♣ ♣ ♣ ♣ ♣ ♣*

*La plej famaj parfumoj de la mondo estas  
tiuj de la firmo DELETTREZ. ♣ ♣ ♣ ♣*



# Papier à cigarettes

## “Le Nil”

Je ne fume  
que “Le Nil”

I only  
smoke “Le Nil”

Ich rauche  
nur “Le Nil”

No fumo  
más que “Le Nil”

Io non fumo  
che “Le Nil”

Я не курю  
какъ только “Le Nil”

Mi fumas  
nur “Le Nil”

### *Franca Literaturo*

656. BACH-SISLEY (Jean). — Rakontoj al mia Belulino, esperantigis L. Touchebeuf . . . 2 »  
479. BILHAUD (P.). — Solo de fluto, trad. F. Doré . . . . . 0 60  
481. CHATEAUBRIAND. — La lasta Abencerago, trad. R. Deshays . . . . . 0 60  
683. FEYDEAU (G.). — Kial ili estas famaj ??? trad. F. Doré . . . . . 0 50  
519 } MIRBEAU (O.). — Ili estas frenezaj, trad. L. Segretinat . . . . . } 1 50  
ANDREJEV (L.). — Ruĝa Rido, trad. L. Avilov . . . . . }
495. MOLIERE. — L'Avarulo, trad. Sam. Meyer 0 75  
496. — Don Juan, trad. E. Boirac . 1 50  
497. — Edziĝo kontraŭvola, trad. V. Dufeutrel . . . . . 0 60  
500. PERRAULT (Ch.). — Rakontoj pri feinoj, trad. S-ino P. Sarpy. . . . . 1 »

### *Germana Literaturo*

462. GRIMM. — Elektitaj fabeloj, trad. Kabe . 2 »  
810. SCHILLER. — La Rabistoj (dramo en kvin aktoj), trad. L. L. Zamenhof . . . . . 2 »

### *Pola Literaturo*

516. ORZESZKO (E.). — La interrompita kanto, trad. Kabe . . . . . 0 75  
680. PRUS (B.). — La Faraono, trad. K. Bein (Kabe), 3 volumoj . . . . . 6 »  
517. SIEROSEVSKI (V.). — La fundo de l'mizero, trad. Kabe . . . . . 0 75  
518. "" . — Pola Antologio, trad. Kabe . . . . . 2 »

### *Rusa Literaturo*

553. GOGOL (N.-V.). — La Revizoro, komedio en kvin aktoj, trad. L. L. Zamenhof . . . 1 50

### *Historio - Geografio -vojaĝoj*

437. DUNANT (H.). — Rememoro pri Solferino, trad. A. Vaillant kaj P. Fruictier . . . 1 25

DE LA SAMA AŬTORO :

**Le Geste.** (Texto franca) — Dramo en versoj,  
en unu akto..... 2 50

(Mendebila de la *Librairie de l'Esperanto.*)

PRI-NEŬTRA-MORESNETO

(Ankaŭ mendebila de la *Librairie de l'Esperanto, Paris.*)

G. Roy. — **Projet d'un État espérantiste indé-**  
**pendant**, précédé d'une lettre du Dr Zamenhof 0 50

Ilustritaj poŝtkartoj de Neŭ ra-Moresneto :

14 nigraj ..... 1 40  
12 kolorigitaj ..... 1 80

Malnovaj poŝtmarkoj de Neŭtra-Moresneto (1885) :

La serio da 8 ..... 10 »